

Bona Espero



Cirkulero 66

por la amikoj kaj subtenantoj de Bona Espero r. a.

majo 2006

prezidanto: Otto Nelken ★ Hirschfeldstr. 6 ★ D-59581 Warstein

☎ +49-(0)2902-57460 ★ 📠 +49-(0)2902-911323 ★ 💻 u. nelken@t-online.de

25 jaroj de subtena organizaĵo Bona Espero r.a. !!!



Rilate al tiu ĉi speciala okazaĵo ni ricevis sekvantan leteron de Ursula Grattapaglia el Brazilo:

„Estimataj karaj geamikoj kaj subtenantoj de Bona Espero!

En 2006, pli precize en la monato marto, la Subtena Societo por la prospero de Bona Espero r.a., festis sukcesplene kaj feliĉe sian 25jaran jubileon!

Kiam en 1981 ni (t.e. Giuseppe kaj mi) kunsidis en la hejmo de Margret kaj Willi Brandenburg kun simpatia grupo de esperantistoj pretaj kunlabori kun la socia agado en fora Brazilo, mi eĉ ne povis revii pri la evoluo de tiu kunveno!

25 jaroj da solidareco trans landlimoj, trans kulturaj diferencoj, per la nura deziro fari sian parton “por pli bona mondo kaj pli feliĉa homaro” motivigis la fondintojn respondante tiel al la alvoko de la statuto de Bona Espero.

Kontinueco en la servado al la proksimulo estas nek simpla nek ofta. Sed la grupo da homoj, kiu kreskis de jaro al jaro, estas farita de esperanto parolantoj kaj simpatiantoj de la noblaj valoroj de homa solidareco kaj konkreta helpo.

Dankante al tiu grupo da kunlaborantoj, la nuna Estraro de Bona Espero, esprimas el sincera koro sian senliman dankon!

La estraranoj Ulisses, Giuseppe, Clarimundo, Adarci kaj Ursula, kun la revizoroj Lia kaj Enivaldo, ne estus povintaj konstrui la 5 domojn, garantii la elektran energion, la akvoprovizon kaj la transporton por protekti, eduki, nutri kaj instrui la pli ol 400 infanojn sen la helpo de la Subtena Societo en Germanio.



la brazila estraro (sen Adarci) de dekstre: Clarimundo, Giuseppe, Ursula, (Vanda), Ulysses, Enivaldo, Lia

donacokonto:

konto-numero 26 484 ĉe Sparkasse Meschede
(BLZ / bankkodo 464 510 12)

kasistino:

Dagmar Rahn ☒ Hirschfeldstr. 3 ☒ D-59581 Warstein
☎ +49-(0)2902-700330, 📠 +49-(0)2902-700328 ✉ dagmar@rahn76.de

La tri prezidantaj paroj, kiuj laboris, kunordigis, aktivigis, prelegis kaj administris dum la 25 jaroj, estas la geedzoj Margret kaj Willi Brandenburg, sekvitaj de Heti kaj Rudolf Fischer, sekvitaj de Otto kaj Uschi Nelken. Je nia bedaŭro Willi Brandenburg mortis lastjare post sufiĉe longa malsano en la aĝo de 83 jaroj.

Dum preskaŭ dudek jaroj la plej grandioza financa subtenanto estis la vicprezidanto Bernd Schönberner (kiel magiisto "Don Espero") kun sia edzino Petra.

Ĉiuj tiuj noblaj homoj, kune kun siaj gefiloj, donacis multan tempon kaj energion favore al Bona Espero. Kaj la bonesperanoj ĉiam estis tre konsciaj pri la respondeco administri tiun fortan apogon, kiun la estraranoj surloke transformis en edukadon kaj protekton.

Dankon al ĉiuj, kiuj fidele restis dum la longa tempo!

Dankon al tiuj, kies nomoj ne alvenis ĝis al Brazilo, sed sciu ĉiuj, ke via solidareco donis kuraĝon al la estraranoj kaj bonan esperon al tiom da infanoj, kiel hodiaŭ ni povas konstati.

Venontjare Bona Espero festos 50 jarojn da asista laboro, ek de nun, karaj subtenantoj, preparu vian vojaĝon por partopreni!

Ĉiuj estas bonvenaj!"

Kompreneble ankaŭ novaĵojn el Bona Espero ni povas sciigi al vi. Pro tio ni daŭrigas kun raporto de Ursula:

„Kun granda ĝojo ni informas vin, ke nian novan Centron Bona Espero ni inaŭguris la 4an de februaro post entute naŭ monatoj de konstrutempo. Samokaze ni festis la geedziĝon de nia eksa volontulo Riccardo Pinori kaj Giovanna Licciardelli, kiuj aparte venis el Italio. Pli ol 80 gastoj el proksime kaj malproksime aŭskultis la alparoladojn de Giuseppe, Aldo Grassini (prezidanto de la Itala Esperanto Federacio por blinduloj) kaj reprezentanto de la organizaĵo Oomoto – la lastaj estis grandanimaj donacintoj por nia nova domo. Kaj ankaŭ de via subtena organizaĵo ni legis la salutvortojn.

Nia Centro estas hodiaŭ la plej bela domo en nia institucio. Ni mem miras pri nia kuraĝo realigi tiun longjaran revon. Kaj ankaŭ pro tio ni tre kore dankas al ĉiuj subtenantoj!



Susi entuziasme kuiras en la nova bone aranĝita kuirejo kaj servas ĉiutage kvarfoje preskaŭ 40 manĝaĝojn. Ĉio nun estas spacoplena, ni ne devas sidi tiel kunpremitaj kiel antaŭe, kaj precipe dum la pluvsezono la infanoj nun povas ludi kaj fari siajn lerneajn taskojn ĉi tie. Krome ĉe unu flanko troviĝas nia esperanta biblioteko kun tablo, seĝoj kaj tri sofoj, kie ni povas akcepti niajn vizitantojn.

Clarimundo (Tota) fianĉiĝis kun la ĉarma Riviane kaj ambaŭ (30 kaj 24 j.) ŝatas geedziĝi baldaŭ. Li laboras tre engaĝiĝinte kune kun Cassius ĉe la televida sendostacio de Ulysses kaj Vanda.

Orlando, Susi kaj ilia eta Gabriella tre harmonie vivas kun ni. Ni nun donas al ili pecon de nia grundo malantaŭ la urba domo kie li konstruas domon por sia familio. Ni ĝojas kun ili.

Orlando jam laboris pli ol ses jarojn fidele kaj respondece ĉe ni kaj krome estas ekslernanto de ni.

Ekde januaro laboras la 19-jaraĝa Celso ĉe ni, kiu kiel infano vivis en Bona Espero dum ses jaroj.

Kelkfoje same helpas nin Valdemar, kies filinoj ekde tri jaroj lernas ĉi tie. Ankaŭ li estas nia bona ekslernanto kaj krome la frato de la ĉarma instruistino Ursula (mia baptofilino).

Ildete finis la lernejon decembre per abiturienta ekzameno kaj nun monitoras ĉe Ada en la lernejo ĉar la multaj malgrandaj lernantoj ankoraŭ estas tre kaosaj.

Por Mario Garofalo, kiu mortis lastjare, ni „rekonkeris” Enivaldo, kiu jam pli ol 20 jarojn estis en la estraro. Li nun kune kun Lia Milhomen kontrolas niajn financojn kaj - same kiel Paŭlo Nascentes - helpas Ulysses produkti esperantajn televidprogramojn.

Dum nia foresto en somero ĉi foje Orlando kaj Susi kun Celso kaj Valdemar transprenos la respondecon ĉi tie. Normale dum niaj vojaĝoj Adarci anstataŭis nin spertege kaj sukcese en ĉiuj rilatoj de Bona Espero, internaj kaj eksteraj.

Giuseppe kaj mi bonfartas laŭ nia aĝo. Kio mankas al ni, kaj tio ne estas nova, estas posteuloj! Sed konsiderante ke jam hodiaŭ ĉi tie kunlaboras lerte kaj diligente ses ekslernantoj, povus ja esti ke unu el ili iam kapablos kaj pretos por transpreni la tutan respondecan gvidadon.

Finfine lastaj vortoj pri la 25 jaroj de grandioza subteno kaj kunlaboro: Giuseppe kalkulis kun grandaj klopodoj pro la diversaj malsistemoj kaj nestabilaj konvertaj kurzoj, ke via subtena organizaĵo en tiu tempo mondonacis entute la rimarkindan sumon de 302.932,00 eŭroj kaj tiel tio daŭre ebligis nian sukcesan laboron! Al vi ĉiuj por tio denove la elkora danko de ĉiuj bonesperanoj!

Kun la plej bonaj deziroj por vi, karaj geamikoj, ni salutas vin el Bona Espero via Ursula Grattapaglia”

Ni speciale ĝojas pri propra kontribuado de Igor por tiu ĉi cirkulero:

“Mi estas knabo kiel ĉiuj knaboj de 11 jaroj: mi lernas matene en la 6a klaso, kaj posttagmeze mi faras miajn taskojn, helpas en la domo, ludas, legas, kantas kaj ĝuas ĉiujn bonajn aferojn kiujn la mondo oferas al mi.

Mi naskiĝis en Bona Espero kaj ĉi tie mi loĝas ĝis nun.



Kiel filo de eksa lernantino kaj nuna instruistino de Bona Espero mi jam suĉis esperanton el la suĉboteleto. Mi kreskis kun multaj frataj infanoj kaj al kutimiĝis ludi kun esperantistaj volontuloj de diversaj landoj. Kun ili mi balbutis miajn unuajn vortojn kaj mi tuj komprenis ke ne ekzistas lingvaj baroj inter ni.

Kiam en la lernejo mi studis pri Eŭropo, mi revis kaj imagis kiel interesa kaj grandioza povus esti iam viziti tiajn misterajn lokojn! Kaj nun aperis la miraklo! Mia Dio, ĉu mi revas aŭ ĉu estas vera?

Mia patrino kaj mi iros al la Universala Kongreso de Esperanto en Florenco por helpi kaj gvidi blindajn kongresanojn al la diversaj kunsidoj.

Bonvolu, mia horloĝo, rapidigu la montrilojn, ĉar tiel la tempo pli kuras! Kiom da emocio! Kaj se mi estas sonĝanta, bonvolu ne veku min!!!

Sed krome mi tre volus vidi kiel aspektas la neĝo. Sed mi lernis, ke nun tie estas somero, dume en Bona Espero estas malvarma vintro en la nokto.

Kaj mi tre volonte volus viziti lernejojn en Eŭropo por vidi kia diferenco estas. Kion pensas la infanoj tie, ĉu ili havas samajn taskojn en sama klaso kiel mi? Ĉu la infanoj bonkondukas, ĉu ili trompas la instruiston, ĉu la instruistoj estas simpatiaj?

Mi devas pacienci kaj mi nur scios ĉion kiam mi estos tie!”

Karaj geamikoj, ĉiu el ni hodiaŭ rajtas ĝoji pri la spontanea helpemo de kelkaj esperantistoj en Germanio, el kiu sekvis antaŭ 25 jaroj la fondo de nia subtena organizaĵo, kiu ebligis tiun kontinuan subtenon de Bona Espero. La membronombro tre rapide kreskis, ankaŭ homoj el eŭropaj najbaraj landoj kaj neesperantistoj entuziasmiĝis por la subteno de la infanoj.

Konsidere al tiu longa tempo de 25 jaroj same ni el la estraro de la subtena organizaĵo ŝatas danki vin kore kaj ligita al tio laŭdi vin pro via longjara fideleco. Ni ne sufiĉe povas aprezi aparte tiujn, kiuj ekde la komenco aŭ ekde longe helpis Bona Espero, kaj tiujn, kiuj rilate al siaj circonstancoj donacis relative grandan sumon. Ili kaj ĉiuj aliaj subtenantoj ĝoju hodiaŭ pro la certeco, ke ĉiu mondonaco subtenis la infanojn de Bona Espero. Via donaco grave helpis, ke finfine la pli ol 30 jarojn admirinda estrara funkcio de Ursula kaj Giuseppe same kiel la kompetenteco kaj engaĝiĝo de sennombraj kunlaborantoj surloke rezultigis la daŭre efikan sukceson kaj la bonan reputacion de la institucio en la tuta lando.

Karaj malnovaj kaj novaj amikoj de Bona Espero, bonvolu helpi nin ankaŭ estonte en nia komuna laboro por la prospero de la infanoj en Brazilo!



renkonto en Vilnius (de dekstre): Otto Nelken, Giuseppe kaj Ursula Grattapaglia, Petra kaj Bernd Schönberner, Uschi Nelken

*Mi deziras al vi bonan tempon
kaj unue feliĉajn kaj benitajn pentekostajn tagojn.
Otto Nelken*